

La Mondo Rakontas



RAKONTOJ II.

La Mondo Rakontas

el la libreto LMR – Theodor Kilian

en la jaro 1970 kiel lernigaj tekstoj por lingvaj kursoj eldonite en urbo Třebíč.

En elektronikan formon transformis Jindřiška Drahotová
kun Rondeto de MUDr. Josef Hradil, 2020 en Mladá Boleslav.

-
-

Enkondukaj vortoj de la redaktinto

La legolibreto LMR – **La Mondo Rakontas** – konsistas el tri partoj: Lernolibro ABC, Vortareto 808 kaj LMR faras kompletan.

Miaj afablaj geamikoj, kiuj sendis al mi la rakontojn, estas veraj aŭtoroj de tiu ĉi kompilaĵo. La diversnacieco de la aŭtoroj kaŭzis, ke la formo kaj nivelo de la kontribuoj estas variaj. La indiĝenaj kaj popolaj rakontoj, malgraŭ sia simpla formo kaj naiva enhavo estas plenaj de ĉarma bonvolo, senkulpa humoro aŭ homa saĝo.

La plej facilajn rakontojn la kursgvidanto povas legi kun siaj lernantoj jam post kelkaj lecionoj. Tiel la lernantoj konvinkiĝos, ke ili jam kapablas memstare legi. Tio fortigas ilian memfidon kaj vigligas la instruadon. Multajn plezuron kaj utilon al vi, la legontoj!

Theodor Kilian

Třebíč, la 21-an de julio 1969,
kiam la homo la unuan fojon surpaŝis la Lunon.

La leonino kaj la antilopo

Popola rakonto

Antaŭ tre longa tempo vivis leonino. Ŝi naskis idon. Malsana ŝi kuŝis en sia rifuĝejo kaj sep tagojn ŝi terure malsatis. Ŝi diris al si: „Mi iros eksteren kaj serĉos manĝaĵon.” La leonido dormis kaj ŝi eliris. Subite ŝi ekvidis antilopon, kiu sin paŝtis. La antilopo turnis la kapon, ekvidis la leoninon kaj diris: „Bonvenon, kuzino!”

La leonino ekhontis kaj ne kaptis la antilopon.

Per ĝentila vorto la antilopo ŝanĝis la malbonan intencon de la leonino.

El la svahili-lingvo John Williamsoo,
Dodoma Tanzanio, Orienta Afriko.



Tunakufa, tunapotea!

Rakontode la popolo Wakonde

Same kiel en Eŭropo al la blanka raso apartenas en Afriko al la nigra raso multaj diversaj popoloj. Ĉiu havas sian propran lingvon kaj morojn. La popolo Wakonde havas pri la postmorta vivo jenan rakonton.

La praavoj de la nunaj Wakondeoj dubis pri postmorta vivo. Ili ne sciis, ĉu la mortinto por ĉiam malaperas kaj neniam plu revenas. La estroj de la popolo decidis, ke ŝafo kaj hundo respondu tiun ĉi gravan demandon. Pro ĝia senkulpeco ili instruis al la ŝafo la vortojn: „Tunakufa tunarudi,“ tio signifas – „li mortis, li revenos.“ Pro ĝia ratio ili instruis al la hundo la vortojn: „Tunakufa tunapotea,“ tio signifas „li mortis, li ne revenos.“

Kiu el la du bestoj ekparolos la unua, ties vortoj estos la volo de dio kaj respondo al la demando. Tion kredos estonte ĉiuj Wakondeoj. La estraro ordonis, ke la popolo kunvenu je certa tago kaj horo sur la placo antaŭ la domo de la ĉefestro por ekscii la sorton de siaj animoj.

La decida tago venis. Granda popolamaso kunvenis sur la placo. Senpacience atendis la homoj la dian verdikton. Fine eliris la du bestoj el siaj sanktejoj.

La ŝafo, kiu estis malsata, ekvidis sukan herbon. Ĝi ekmanĝis ĝin kaj tute forgesis la du vortojn. Sed la inteligenta hundo irante apud sia instruanto ekbojis: „Gaŭ, gaŭ ... tunakufa tunapokea – li mortis, li ne revenos.“ Nun ankaŭ la ŝafo ekblekis: „Be, be ... tunakufa tunarudi – li mortis, li revenos.“ Sed estis jam malfrue, la hundo ekparolis la unua.

De tiu tempo la popolo Wakonde kredas, ke la homa animo mortas kaj neniam plu revenas. Tunakufa tunapotea!

JeanMiliares, Costermanville, Kongo.



La ujo da mielo

Rakonto de la ekvatora tribo Mpongue

Ramburakinda havis du edzinojn: Ngue-Nkonde kaj Ngue-Lege. Foje li kaŝis ujon da mielo sub sia lito kaj foriris. Reveninte, li vane serĉis la mielon. Li trovis nur la malplenanujon. „Kiu el vi prenis mian mielon?“ li demandis siajn du edzinojn. „Mi ne, mi ankaŭ ne,“ ili repondis. „Bone, vi do ne volas konfesi, sed mi tamen trovos la kulpulinon.“

Post tiuj ĉi vortoj li ordonis al Ngue-Nkonde fari *oboi* – teksaĵo el kelkaj pecoj. Kiam la teksaĵo estis farita, Ramburakinda forportis ĝin al sia fetiĉo Foceno kaj diris: „Sur tiu ĉi teksaĵo miaj du edzinoj transiru unu post la alia la enfluegon de nia riverego en la maron. Al la senkulpulino faru nenion malbonan, kulpulinon dronigu!“

„Transiru la unua,“ diris Ramburakinda al Ngue-Lege. Kaj Ngue-Lege singarde iris paŝo post paŝo sur la teksaĵo servanta kiel balanca ponteto kaj petis laŭ popola kutimo kompaton per jena kanto:

*Mi petegas jen, indulga Focen'
gardu min sur ĉi balanca pont'
savu min de l' mort'kaj hont'
mi petegas jen, indulga Focen'*

Sana ŝi atingis la kontraŭan bordon, ŝi estis savita.

„Estas nun via vico. Ngue-Nkonde, transiri la enfluegon.“

Kaj Ngue-Nkonde paŝante sur la teksaĵ-ponteto, kantis la saman petkanton kiel Ngue-Lege, sed je la fino ŝi aldonis: „*Aŭdu min, petegas mi la preferata de Regnambil.*“

Ĉiuj okuloj streĉe sekvis la malfeliĉulinon. Sed jen! Subite ŝi malaperis... la fetiĉo *Foceno* forportis ŝin en la fundon de la maro... Tiel pereigis Ramburakinda sian edzinon pro nura ujo da mielo.

El la gabuna lingvo
Andr  Courtis, Ekvatora Afriko.



La peza rastilo

El Argentino

Foje kamparano diris al siaj du helpantoj: „Iru al nia najbaro kaj alportu de li rastilon.” Ili iris. Kiam la najbaro montris al ili grandan rastilon, unu el ili ekkriis: „Kiel ni povas forporti tiel pezan rastilon?”

La alia, kiu tre fieris pri sia forto diris: „Ne plendu, mi sola forportos ĝin. Helpu nur loki ĝin sur mian dorson kaj vi vidos.”

La junulo, ŝarĝita per la rastilo ekmarŝis. Dume lia kamarado flatis al li: "Ho, vi estas vere forta. Neniam mi tion kredus, se mi tion ne vidus. Vi estas vera fortulo. Sed ripozu momenton, permesu, ke mi helpu vin."

„Ne, ne," respondis la alia. Per la flataj vortoj li estis pli fortigita ol lacigita per la ŝarĝo. "Vi vidos, ke mi tute sola portos ĝin ĝis la farmodomo."

Kaj efektive. Li alvenis al la farmodomo lacega, sed fiera. Dume la alia senĉese ripetadis: „Tio estas mirinda, neniam mi vidis ion similan."

A.Villafranca, Buenos Aires, Argentino.



La Plorantino - La Plorana

Meksika popola mito

En la jaro 1521 konkeris Don Hernán Cortés Meksikon. Al li helpis la bela indiĝenino Malintzin, kiu servis al li kiel interpretistino. Ŝi fariĝis kristanino kaj ricevis la nomon Marina. Post kelka tempo Marina naskis infanon. Sed Don Hernán, kiu estis patro de la infano, forprenis lin al la patrino. Marina freneziĝis pro senlima doloro kaj malbenis la kruelan patron. En sia malespero ŝi mortigis sin.

Ŝia fidela maljuna servistino Juris antaŭ la kadavro de la amata knabino deklaris, ke ŝi kaj ŝia gento venĝos ŝian morton al idaro de Don Hernán: ili mortigos ĉiun unuenaskiton! Tiun ĉi teruran ĵuron plenumadis ŝia gento dum la sekvintaj jarcentoj.

La animo de la malfeliĉa Marina serĉas sian fileton ĝis la hodiaŭa tago. Kiel fantoma blanke vestita virino ŝi eligas dum mallumaj noktoj longan, doloran, korŝiran krion, kiu timigas eĉ la plej kuraĝajn virojn. Estas multaj homoj, kiuj asertas, eĉ ĵuras, ke ili pli ol unu fojon aŭdis la teruran, superhoman plendon de la Plorantino, plendon plenan de profunda doloro kaj malespera ploro, plendon de vundita patrino koro ...

El la hispana D-ro Fardique Fernandez, Meksiko



Kio timigis eĉ tigon

Popola rakonto

Sur la insulego Borneo ne vivas tigroj. Jen kiel la idiĝenoj klarigas tiun ĉi feliĉan fakton:

Iam, antaŭ longa tempo la reĝo de la bestoj sur la Malaja Duoninsulo anoncis al la bestoj de Borneo, ke li intencas veni al Borneo por ankaŭ tie regi.

Ĉi tiu sciigo konsternis kaj timigis la bestojn de Borneo. Sed la ruza cerveto Plandoko diris: „Timu nenion!“ Kaj li skribis al la reĝa tigro leteron, ke la bestoj de Borneo ege ĝojas je lia alveno kaj kore bonvenigos Lian Reĝan Moŝton. „Sed mi devas atentigi Vian Reĝan Moŝton,“ li aldonis, „ke jam regas tie ĉi alia tigro, grandega, fortega kaj potenca.“ En leteron li metis pikilon de histriko kaj aldonis: „Tio estas harego de nia nuna reĝo.“

La reĝa tigro de la Malaja Duoninsulo neniam venis kaj dank'al la ruzeco de la cerveto Plandoko ne vivas kaj neniam vivis tigroj sur la insulego Borneo.

El la malaja R.Vaughan, Sandakan,
Norda Borneo



La fidela servistino

Rakonto el la hinda historio

Antaŭ longa tempo vivis Akbar la reĝo de Hindujo. Li estis granda kaj bona reĝo. Liaj popoloj sincere amis lin kaj estis fidelaj al li.

En sia ifanaĝo li vivis en Ĉitur. Foje, en malluma nokto, kiam ĉio dormis, sidis Punna, lia fidela vartistino apud lia lulilo kaj kantis lulkanton. Ŝia propra fileto, kiu havis la saman aĝon kiel la princo, ludis sur la planko apud ŝi.

Subite enkuregis en la ĉambron servisto kaj diris: „Ekstere estas malamikoj, kiu volas mortigi la princon.” Punna rapide leviĝis kaj rigardis ĉirkaŭe por trovi manieron, kiel savi la princon. Sur la planko staris malplena korbo, en kiu servistino alportis fruktojn al la princo, La vartistino rapide senvestigis la dormantan princon kaj metinte lin en la korbon, kovris lin per folioj kaj fruktoj.

„Rapide, forportu ĝin,” ŝi ordonis al la servisto. Poste ŝi vestis sian belan fileton per la princaj vestoj, metis lin en la lulilon kaj sidiĝis apud li.

En tiu ĉi momento malfermiĝis la pordo. „Kie estas la princo?” kriis kolera homo kun ponardo en la mano. Punna ne povis paroli. Ŝi mute nur montris per tremanta fingro la lulilon. La viro alkuris al la lulilo kaj mortigis la dormantan infanon.

Rakontis Anena Christensen, Ambur, Hindujo



Bona solvo

El Irano

Ŝahpur Sosani estis reĝo de Persio kaj vivis en la 4-a jarcento. Kiam li estis ankoraŭ knabo, li aŭdis unu tagon bruon ekster la kortego. Li demandis siajn korteganojn, kio okazis. Ili respondis: „Urbanroj pasas la ponton, kiu estas apud la kortego. Ĉar la ponto estas tro mallarĝa por tiom da pasantoj, tial ili insultas sin reciproke, disputas kaj krias.“

La reĝo iom pripensis kaj diris: „Kian konsilon vi povas doni al mi por forigi la malhelpaĵon?“

Unu el la korteganoj respondis: „Starigu ĉe la ponto soldatojn kaj ili reguligu la transiradon.“

La konsilo ne plaĉis al la juna reĝo: „Iu el la pasantoj povus havi urĝan aferon kaj la deĵoranta soldato povus malhelpi lin, ke li ĝustatempe atingu sian celon.“

„Do kio estas farota laŭ la opinio de Via Reĝa Moŝto?“ demandis la altranguloj per respekta voĉo.

„Oni tuj ekkonstruu duan ponton; unu ponto servos al la pasantoj irantan enurben, la alia al la irantoj reen.“

Tiel ordonis la reĝo Ŝahpur Sosani kaj la kontenta urbanaro laŭdis lian saĝon.



Bahman Ŝidani, Teherán, Írán.

La trezoro

El Turkujo

Haĝi Mehmet estis tre riĉa viro. Antaŭ sia morto li venigis al sia lito siajn tri filojn. Ili estis junaj kaj fortaj. La maljuna patro diris: „En nia ĝardeno estas granda trezoro, iru kaj serĉu ĝin!“

„Sed la ĝardeno estas granda, en kiu loko ĝi troviĝas?“ demandis la filoj. La patro balancis la kapon: „Ne, tion mi ne diros al vi. Trafosu la tutan ĝardenon kaj vi certe ĝin trovos.“ La patro mortis.

Post lia enterigo la filoj ekfosis. La tutan ĝardenon ili jam trafosis, sed la serĉatan trezoron ili ne trovis. Por ke ilia laboro ne estu tute vana, ili semis grenon en la bone preparitan grundon. Post kelkaj monatoj riĉa rikolto rekompencis ilian laboron. Tio ripetiĝis multajn jarojn, ĝis ili fariĝis riĉuloj.

Nur nun ili ekkomprenis, ke la trezoro, pri kiu parolis la mortanta patro ne estas oro, sed laboro.

Mehmet Hulusi, Haĝi Mustafa, Aidin, Turkujo.



Du viroj – fratoj

Popola rakonto el la insulo Javo

Oni rakontas, ke Mataran estis jam en la 16-a jarcento lando bela kaj riĉa. En tiu tempo vivis du malriĉaj viroj: Ki Pemanahan kaj Ki Ageng Giring. Ili amis sin reciproke kiel fratoj. Ki Pemanahan forte deziris, ke lia ido fariĝu potenca princo reganta la tutan Javon.

Foje laboris Ki Ageng Giring en la arbaro. Subite li aŭdis voĉon, kiu venis de sur proksima kokosujo: „Sciu, viro, kiu eltrinkos la sukron de mia nukso per unu fojo, havos idon kaj tiu ĉi ido fariĝos potenca princo reganta la tutan Javon.”

Aŭdinte la voĉon, Ki Ageng Giring rapide grimpis sur la arbon kaj forŝiris la solan grandan nukson, kiu estis sur la arbo. Li senŝeligis ĝin kaj iris hejmen. Ĉar li ne soifis, li reiris en la arbaron por kolekti lignon. Sed forirante, li diris al sia edzino: „Neniu prenu la nukson. Kiam mi revenos, mi eltrinkos ĝian sukron.”

Apenaŭ li estis foririnta, venis Ki Pemanahan. „Mi ne vidas mian fraton,”

„Li foriris en la arbaron,” diris lia edzino.

Ki Pemanahan diris: „Mi tre soifas kaj via akvujo estas malplena.” Kaj ekvidante la senŝeligitan nukson, prenis ĝin.

„Ne, ne! Ne prenu ĝin! Via frato diris al mi, ke neniu prenu ĝin! Se vi ĝin prenos, via frato certe koleros kontraŭ mi.”

Ki Pemanahan respondis. „Fratino mia, ne timu, Diru al li, ke mi ĝin eltrinkis, ĉar mi tre soifis, Li certe ne riproĉos vin.” Li faris truon en la nukson kaj eltrinkis ĝian sukron per unu fojo, ĉar granda estis lia soifo.

Kiam Ki Ageng Giring trankviliĝis, li klarigis ĉion al Ki Pemanahan kaj diris: "Viaj idoj fariĝos do princoj de Javo. Frato mia, post via ido fariĝu mia ido princo de Javo kaj post li denove la via: alterne unu post la alia."

Ki Pemanahan silentis. Tiam Ki Ageng Giring diris: "Post la dua ido." Ki Pemanahan ree silentis. Kiam Ki Ageng Giring diris: "Post la sepa ido," Ki Pemanahan diris: "Frato

mia, tion decidi ne estas en mia forto, tio dependas de la sorto."

Ki Pemanahan adiaŭis sian fraton Ki Ageng Giring kaj iris hejmen al Mataran.

El la java al Esperanto tradukis K.Wirjosaksono, Klaten, Javo..



Koro el diamanto

Fabelo el Vietnamio

Vespera krepusko ... Princino Ly-Nuong promenante en la reĝa ĝardeno supreniris en la pavilonon Nhué-Khanh. Malproksime kaj sencele vagis ŝia melankolia rigardo... Ĉe la horizonto siluetiĝis violkoloraj montetoj, malproksime serpentumis rivereto...

Subite eksonis vibranta sono de fluto. La sentema princino estis kvazaŭ ensorĉita. Ŝiaj vangoj ruĝiĝis, ŝia koro pli vigle batis Tra la vesperaj ombroj vidiĝis barketo, el kiu ploris fluto.

Ekde tiu tempo la princino Ly ĉiuvespere aŭskultis kun ĝojo en la koro la plendantan kanton. Senintence akiris la mistera flutisto la animon de la princino, kies koro imagis junan belulon.

Unu vesperon vane atendis Ly-Nuong la barketon. Ĝis nokto ŝi atendis, la barketo ne venis, Doloro kaj tristo plenigis ŝian koron. Ŝi malsaniĝis. Febro skuis ŝian korpon. Neniu el la kuracistoj , eĉ ne plej eminentaj , kapablis resanigi ŝin.

Unu vesperon ree eksonis la kanto de la mistera flutisto. Ly-Nuong ridetane avide aŭskultis. La deĵoranta kuracisto nun komprenis ĉion. La sekvantan tagon timema fiŝkaptisto prezentis sin laŭ reĝa ordono antaŭ la princino por ludi fiuton. Li estis malbela. Kiam Ly ekkonis en li sian imagitan belulon, ŝi tuj remalsaniĝis, elreviĝis ... La fiŝisto ekkomprenis la principinon, malsaniĝis ankaŭ kaj mortis. Ĉielen irante li portis en sia koro la bildon de la princino.

Misterplena nokto.... La resaniĝinta princino supreniris en la pavilonon. Subite aŭdiĝis de la rivero, kvazaŭ eĥo, la fatala sono de la plendanta fluto La princino denove malsaniĝis. Ŝi estis mortonta. Heroldoj de la reĝo serĉis la faman flutiston, sed vane. Laŭ lia deziro oni enterigis lin apud la rivero.

Mandarenoj proponis translokigi lian tombon, sed kiam oni malfermis ĉerkon, nenio restis el la kadavro ol lia koro, kiu ŝanĝiĝis en sangkoloran diamanton. La reĝo ordonis fari el ĝi pokalon. Kiam oni verŝis vinon en la pokalon, tuj aperis la silueto de la kompatinda flutisto kaj el la pokalo aŭdiĝis misteraj sonoj de fluto.

Kiam la princino Ly-Nuong vidis la tiel fidelan koron de Tuong-Chi, ŝiaj okuloj pleniĝis per larmoj kaj grandaj gutoj falis sur la pokalon. Sed kiam la larmoj ĝin tuŝis, ĝi disfalis, ruiniĝis ...

En la vjetnama tradukis Trinhdinh Kinh,
Hanoi.



Koit kaj Āmarik

El Estonio

Ĉu vi konas la lampon en antaŭĉambro de Vanaisa?

Ĉu vi konas la manon, kiu akceptas la Sunon kaj ĝin ripozigas, post kiam ĝi finis sian vojaĝon?

Ĉu vi konas la manon, kiu ekbruligas la Sunon antaŭ ĝia migrado sur la firmamento?

Vanaisa havis du fidelajn sklavojn, al kiuj li donacis eternan junecon. Kiam la suno finis la unuan fojon sian migradon, diris Vanaisa al Āmarik-la krepusko: „Al vi, filineto, mi konfidas la subirantan Sunon. Estingu kaj gardu ĝin!“ Kaj kiam la Suno la sekvantan matenon devis denove komenci sian migradon, tiam Vanaisa diris al Koit-la aŭroro: „Fileto, via devo estos ekbruligi la lampon kaj prepari ĝin al nova migrado.“

La gejunuloj fidele plenumis siajn devojn kaj eĉ unu tagon ne mankis la lampo sur la firmamento. Kaj kiam ĝi vintre iradis ĉe la horizonto, tiam ĝi estingiĝis vespere pli frue kaj komencis matene malplifruie sian vojaĝon. Sed printempe, kiam ĝi vekis la florojn kaj somere maturigis la grenon per siaj varmegaj radioj, ĝi havis nur mallongan tempon por ripozi. Tiam venis la bela tempo, kiam la birdoj kaj homoj kantis siajn la plej belajn kantojn. Koit kaj Āmarik staris momenton vid-al-vide. Sed kiam la estingiĝanta suno transiris de unu amanto al la alia, Koit prenis la manojn de Āmarik kaj iliaj lipoj intertuŝiĝis.

Neniu tion vidis. Ĉio dormis. Sed unu okulo, kiu dormetas neniam, rimarkis, kio sekrete okazis en noktomezo. Sekvantan tagon Vanaisa diris al la geamantoj: „Mi estas kontenta pri vi, vi fidele plenumas viajn devojn kaj mi deziras, ke vi estu feliĉaj: geedziĝu kaj plenumu de nun vian laboron kiel edzo kaj edzino.“ Sed ambaŭ respondis kvazaŭ per unu buŝo: „Vanaisa, ne detruu nian feliĉon! Permesu al ni resti eterne fianĉo kaj fianĉino, ĉar ni trovis nian feliĉon en la gefianĉeco, en kiu la amo estas eterne juna kaj nova.“

Vanaisa plenumis ilian peton kaj benis ilian estontecon. Nur dum kvar semajnoj en la tuta jaro ili renkontiĝas, kiam Āmarik transdonas la estingiĝantan sunon al sia amanto. Tiam ili reciproke premas al si manojn kaj kisas unu la alian kaj la vangoj de Āmarik ruĝiĝas de la ĉielruĝo, ĝis Koit denove ekbruligas la ĉielan lampon kaj la flava lumo ĉe la ĉielrando anoncas la releviĝantan sunon ... Por ilia renkontiĝo Vanaisa ornamas ankoraŭ nun la kampojn per la plej belaj floroj.

Peeter Ernits, Valga, Estonio.



La senkora avarulo

Legendo el norda Italujo

En la lasta nokto de la jaro pendigas la kamparanoj loĝantaj en la valoj ĉirkaŭ la Lago de Komo sur siaj pordoj bastonon, sakon kaj pecon da pano. Ĉu vi scias kial?

Aŭskultu:

Anataŭ multaj jaroj ĝuste en la nokto de sankta Silvestro, kalkulis mastro Tobio sian monon. Li estis riĉa, sed tre avara. Subite iu frapis sur la pordo de lia kabano. Tobio, kaŝinte la monon, malfermis. Neĝo kaj glacia vento frapis lian vizaĝon..... estis terura. inferna nokto. Antaŭ li staris malbone vestita maljunulo: "Mi estas malriĉa vojiranto, la tempesto surprizis min kaj mi devojiĝis. Permesu al mi tranokti en via fojnejo."

„Ne, ne! Al neniu mi permesas dormi en mia fojnejo. Iru, iru for! Nenion mi povas fari por vi! Iru for!"

„Donu al mi, mi petas vin, almenaŭ pecon da pano!"

„Mi ne havas panon, iru!"

„Donu al mi sakon aŭ ĉifonon, por ke mi povu kovri miajn ŝultrojn, mi preskaŭ mortas pro la frostoj."

„Mi havas nek sakon nek ĉifonon."

„Donu al mi bastonon, por ke mi povu apogi min sur ĝi."

"Mi ne havas bastonon, " kolere respondis mastro Tobio kaj brufermis la pordon antaŭ la malfeliĉa vojiranto. Li reiris al sia amata mono. Sed ho teruro! Li trovis anstataŭ sia mono plenmanon da sekaj folioj!

Mastro Tobio freneziĝis kaj finis siajn tagojn vagante tra la hejmaj valoj kaj rakontante al ĉiu pri sin malfeliĉo. De tiutempo pendigas la vilaĝanoj en la lasta nokto de jaro sur dompordo: bastonon, sakon kaj pecon da pano.

El la itala tradukis V. Baldini, Milano, Italujo.



La oreloj de la paroĥestro

Portugala popola rakonto

Sperta ĉasisto alportis domen du perdrikojn. Li donis ilin al sia edzino kaj diris: „Mi invitis la paroĥestron, unu perdrikon manĝos mi, la alian la paroĥestro, preparu ilin bone, por ke ili estu bongustaj!”

La edzino koleris, ĉar la edzo ne invitis ankaŭ ŝin. Ŝi stufis la perdrikojn kiel eble plej zorge kaj plej bone, kaj por venĝi al sia edzo, manĝis ilin ... ŝi mem!

Kiam alvenis la paroĥestro, la virino diris al li: „Forkuru, sinjoro, ĉar mia edzo diris, ke li fortranĉos al vi ambaŭ orelojn. Kaj la invito manĝi kun li perdrikojn, estas nur preteksto por allogi vin ĉi tien.”

La paroĥestro volis nenion plu aŭdi kaj rapidege forkuris. Pasis nur kelkaj momentoj kaj venis la edzo. Li demandis: „Ĉu la paroĥestro ankoraŭ ne venis?”

„Ho jes, li estis jam ĉi tie, sed li ne volis vin atendi, li do prenis la du bonguste stufitajn perdrikojn kaj forkuris.”

La konsternita viro elkuris el la domo kaj ekvidis ankoraŭ la forkurantan paroĥestron. Li kriis post li: „Sinjoro, lasu al mi almenaŭ unu!”

„Nek unu, nek du!” respondis la kuranta maljuna paroĥestro.

El la portugala tradukis D-ro Pedro Serra, Aveiro, Portugalujo.



Al kiu kantis birdeto

El Bulgario

Du vilaĝanoj iris en la urbon kaj haltis sub granda arbo por ripozi en ĝia ombro. Apenaŭ ili sidiĝis, sur la arbo ekkantis birdeto. Dum kelka tempo ili aŭskultis kun plezuro la dolĉan kanton. Fine unu el ili diris: „Vidu kaj aŭskultu kiel bele ĝi kantas al mi.”

„Ne al vi, sed al mi ĝi kantas,” diris la alia.

Kaj ili komencis disputi, ili disputegis kaj fine ili iris al la juĝisto, por ke li prijuĝu ilian disputon. Enirinte en la juĝejon, unu el ili subdiris al la juĝisto: "Decidu, ke al mi kantis la birdeto." Kaj metis en lian manon dudek groŝojn por lin subaĉeti.....

Pli poste venis la alia kaj flustris al la juĝisto la samon: „Sinjoro juĝisto, aljuĝu, ke al mi la birdeto kantis" kaj enlasis en lian manon kvardek groŝojn.

Ambaŭ vilaĝanoj eliris kaj senpacience atendis la verdikton. Post kelka tempo la juĝisto ordonis al la servisto alvoki vilaĝanojn internen. Juĝisto diris al la unua: „Nu, diru al mi, kial vi interdisputas!" Kaj la vilaĝano rakontis kio okazis. La juĝisto silentis kaj ŝajnis, ke li pripensas kaj poste li diris: „Amikoj, la birdeto kantis al neniu el vi, ĝi kantis al...mi!" Dirinte sian saĝan verdikton, li montris al ili la pordon kaj enpoŝigis sesdek groŝojn....

Kiel ofte oni disputas pri tio, al kiu la birdeto kantis...!

St. Minkon, Sofia, Bulgario.



Pri viro, kiu deziris edziĝi al feino

El Islando

Iam en antikva tempo renkontis juna viro belegan feinon. Li enamiĝis al ŝi kaj ili geedziĝis. Ili vivis en granda feliĉo. Sed baldaŭ la viro konstatis, ke lia edzino ne estas feino kaj tial li forlasis ŝin.

Li estis tre malfeliĉa. Li vagadis sola en la montaro kaj arbaroj kaj sopiris sian perditan feliĉon. La ordinaraĵoj ne plaĉis al li. Iun tagon, vagante en monteta laŭa regiono, li subite staris ĉe profunda fendego. Li ĉirkaŭrigardis serĉante lokon, kie li povus transsalti la fendegon. Subite li ekvidis sur la kontraŭa rando ĉarmegan feinon. Ŝi estis tiel belega, ke li neniam imagis al si, ke tiel ĉiela feino povas ekzisti. Ŝi staris tie en nekomparebla beleco, la radioj de la suno brilis sur ŝia ora hararo kaj ŝi dolĉe ridetis al li. La viro staris kvazaŭ sorĉita. Li deziris posedi ŝin kiel edzinon, ĉar li sentis, ke li amas ŝin per sia tuta koro kaj animo.

Li mansignis al ŝi, sed ŝi turnis sin kaj kuris for. Senhezite li transsaltis la fendegon kaj postkuris ŝin. Jen li vidis ŝin tute proksime, jen tre malproksime kaj lia sopiro al ŝi konstante kreskis. Fine li sukcesis. Li kaptis la feinon, prenis ŝin en siajn brakojn kaj volis kisi ŝin. Sed jen: kun granda miro li vidis, ke tiu ĉi belega estaĵo ne estas feino, sed lia ... edzino, kiun li forlasis.

Björn P.Blöndal, Hvammstanga, Island.



La sprita juĝisto

El Albanio

Dum la turka regado en Albanio vivis en montara vilaĝo maljuna kaj respektinda kadio. Li estis saĝa kaj sprita. Krom tiuj ĉi virtoj nia kadio havis nebelan manieron. Li nome ne povis vidi pladon kun manĝaĵo, sen preni peceton kaj tuj gustumi ĝin.

Foje vizitis lin guberniestro kaj nia kadio gastigis la gravan personon kiel eble plej bone. Ĉe la tagmanĝo la tablo estis plena de diversaj bongustaj manĝaĵoj kaj meze, kiel la plej valora ornamaĵo, kuŝis orkolora ansero, ĵus eltirita el la bakforno.

La guberniestro dece honoris la gastiganton, neniel intencante forlasi la pladon netuŝita. Bona parto de ĉiuj manĝaĵoj malaperis en lia stomako. Fine venis vico ankaŭ al la ansero. Nia kadio, laŭ antikva kutimo, proponis al sia gasto la honoron distranĉi la anseron. La guberniestro rapide prenis la varman, bonodoran anseron per siaj lertaj kaj spertaj fingroj, kaj lekante siajn lipojn, avide rigardis ĝin. Sed jen! La ansero havis nur unu piedon, la alia estis majstre eltirita! Tiun formanĝis nia kadio laŭ sia kutimo tuj, kiam oni eltiris la anseron el la bakforno.

„Ho, tiel bela ansero kaj ... unupieda!“

Sed nia kadio neniel konfuziĝis: „Via guberniestra moŝto devas scii, ke en nia regiono la anseroj havas nur unu piedon.“

„Ĉu vere?“ miris la gasto. „Tion mi dezirus vidi.“

„Tre volonte, post la tagmanĝo mi montros al via moŝto tutan aron da unupiedaj anseroj,“ respondis trankvile la kadio.

Post la tagmanĝo li gvidis sian gaston al rivereto, kie centoj da anseroj staris sur unu piedo.

„Jen, niaj unupiedaj anseroj,“ ruze diris nia kadio. Sed la guberniestro prenis sian pistolon kaj ekpafis kontraŭ la anseroj. Timige ili diskuris ... sur du piedoj! Ridetante turnis sin la guberniestro al nia kadio: „Nu, sur kiom da piedoj ili forkuris?“

Sed ankaŭ nun nia kadio neniel estis embarasita kaj trankvile respondis: „Tio estas tute komprenebla! Se oni pafus kontraŭ via moŝto, via moŝto forkurus ne nur sur du piedoj, sed eble sur ... kvar!“

Kion respondis la guberniestro, tion la rakonto ne diras.



Janko Pali, Quepajro, Albanio.

La cervo kaj la jaguaro

Popola rakonto de brazilaj indiĝenoj

La cervo diris: „Mi estas ŝarĝita de multe laboro, kaj tial mi tuj elektos bonan lokon por fari mian domon.” Li ekiris sur la riverbordo, trovis bonan lokon kaj diris: „Tiu ĉi loko plaĉas al mi.”

La jaguaro ankaŭ diris: „Mi estas ŝarĝita de multa laboro, kaj tial mi tuj elektos bonan lokon pro fari mian domon. „ Li iris kaj veninte al la sama loko jam elektita de la cervo, diris: „Kia bona loko! Tie ĉi mi faros mian domon.”

La morgaŭan tagon venis la cervo eliris la herbaĉon kaj zorge ebenigis la lokon. La sekvintan tagon venis la jaguaro kaj diris: „Tupan – la ĉefdio de la brazilaj indiĝenoj helpas min.” Li starigis fostojn kaj ĉarpentis la domon. En la morgaŭo venis la cervo kaj diris: „Tupan min helpas.” Li tegmentis la domon kaj faris du ĉambrojn: unu, kiun okupos li mem, kaj la duan okupos Tupan. La morgaŭon, trovinte la domon jam preta, la jaguaro tien transloĝiĝis kaj elektis unu el la ĉambroj por dormi.

La sekvintan tagon la cervo venis kaj okupis la duan ĉambron. En la morgaŭo ili vekiĝis, vidante la cervon, diris al li la jaguaro: „Ho, ĉu ja vi min helpis?” La cervo respondis: „Mi mem.” La jaguaro diris: „Nu, se estas tiel, ni de nun loĝos kune.” La cervo diris: „Nu, bone.”

La sekvintan tagon la jaguaro diris: „Mi iros al la ĉasado. Purigu la domon, enportu akvon kaj brullignon, ĉar mi ja revenos malsata.” Li ekiris al la arbaro, ĉasis grandegan cervon, ĝin alportis hejmen kaj diris al sia kunulo: „Preparu ĝin por nia manĝo.”

La cervo preparis sian samgentulon, sed lia koro tristis, li ne volis manĝi, kaj nokte li ne dormis timante, ke la jaguaro ankaŭ lin kaptos. La morgaŭon la cervo siavice iris al la arbaro, tie li trovis grandegan jaguaron kaj, post kelkaj paŝoj, mirmekofagon. Li diris al la mirmekofago: „Tiu jaguaro, kiun vi vidas, klaĉas terure kontraŭ vi”.

La mirmekofago tuj alpaŝis al la jaguaro, kiu ĝuste tiam akriĝis siajn ugojn gratante per ili arbotrunkon, senbrue alproksimiĝis, ĉirkaŭprenis la jaguaron de malantaŭe, enigis en lian koron sian akrepintan ungegon, kaj la jaguaro mortis. La cervo alportis hejmen la mortintan jaguaron kaj diris al sia kunulo: „Jen vi havas preparu ĝin por nia manĝo! La jaguaro pretigis sian samgentulon, sed ne manĝis: lia koro estis vualita de tristo.

Kiam falis la nokto, neniu el ili dormis: la jaguaro observis la cervon, la cervo gardis sub streĉa rigardo la jaguaron. Je noktomezo ambaŭ estis lacaj de tiu kontraŭstaro en la dormo: la kapo de la cervo ekfrapis la liton. La jaguaro ekpensis, ke la cervo intencas lin tuj mortigi, kaj eksaltis kun granda bruo. La cervo ektremis, kaj ambaŭ disforkuris en kontraŭaj direktoj.

El la portugala esperantigis D-ro Porto Carreiro Neto, L.K. Rio de Janeiro -. Brazilo

Matiaso la Justa

Hungara rakonto

En la 15a arcento regis en Hungario la potenca reĝo Matiaso la Justa, kiu estis edukita ĉe la ĉeĥa kortego de la reĝo Georgo de Poděbrady, kies bofilo li poste fariĝis.

Foje Matiaso invitis aristokratojn de la lando al granda festeno. Ĉeestis ankaŭ la plej eminentaj artistoj kaj scienculoj. Belaj tostoj estis diritaj. Oni rememoris ĉiujn klasojn de la popolo, ĉiujn okupojn de la civitanoj, nur la simplaj laboristoj estis forgesitaj.

Matiaso atente aŭskultis kaj rimarkis la mankon, sed diris nenion. Post la festeno kaj iom da ripozo Matiaso la aristokratojn invitis promeni al la vinbermonto, kie laboristoj estis okupitaj. Kontrolante la laboron. la reĝo mem prenis pioĉon kaj eklaboris, invitante ankaŭ la aristokratojn provi por ili nekutiman laboron. Vole-nevole devis ankaŭ la ĉefuloj de la lando eklabori, sed baldaŭ pro ŝvito kaj laco ili devis ĉesi.

Kun riproĉo en la voĉo diris al ili Matiaso: „Dum tostado vi forgesis la utilan kaj gravan taskon de la laboruloj. Nun propramane vi spertis ilian penon. Estonte estimu ankaŭ tiujn, kies laciga laboro donas al ni ĉion, kion ni por la vivo bezonas.”

El la hungara Julio Nemethy, Budapest,
Hungario.



La poeto kaj la reĝo

Sveda legendo

La sveda reĝo Gustavo tre ŝatis la poeton K. M. Bellman. Pro lia saĝo la reĝo faris lin kortega konsilanto, kies konsilon li petis kaj sekvis en ĉiuj gravaj ŝtataj aferoj. Foje la poeto respondis al li troete akre, tial li perdis reĝan favoron, kaj la reĝo malpermesis al li veni la kortegon. Sed ĉiujn gravajn aktojn oni sendis al li en la loĝejon.

Tiu ĉi solvo de la afereto gajigis kaj samtempe kolerigis la poeton. Foje Bellman sciiĝis, ke la reĝo rajdos preter lia domo. Li decidis ludi al la regnestro instruan scenon. Je horo, je kiu la reĝo estis anoncita li forte sapumis siajn vangojn kaj razisto, staranta sur alta ŝtupetaro antaŭ lia malfermita fenestro en la unua etataĝo, razis lin kun la plej seriozna mieno.

Venis la reĝo. Li haltigis sian ĉevalon, observis kelkan tempon la komikan scenon kaj fine li mirigite demandis: „Diabloj! kion signifas tiu ĉi komedio?”

La poeto trankvile respondis: „Mia razisto, Via Moŝto, perdis mian favoron kaj mi malpermesis al li mian domon. Sed ĉar mi mem ne povas helpi al mi sen tiu ĉi fripono, mi tiel aranĝis la aferon.”

La reĝon ridigis la spirita respondo tiel forte, ke li preskaŭ falis teren de sur la ĉevalo. Ekde tiu tempo la poeto estis ĉe la kortego denove bonvena kiel antaŭe.

El la sveda - Elnar Karlson.



Sufiĉis unu sola vorteto

Viena humuro

La malgranda Rudi estas granda amiko de aŭtomobiloj. Li vizitas la unuan klason, tamen li konas ĉiujn markojn de aŭtoj, kiuj veturas en Vieno. Lia granda deziro estas havi belan, novan, veran aŭtomobilon. Foje li enkuris en la ĉambron kun ega bruo.

„Kio okazis, ke vi tiel bruas kaj eĉ forgesis saluti?" demandis la patrino. „Imagu , panjo, hodiaŭ mi povus jam havi mian propran belegan aŭton, sufiĉis nur unu eta vorto," ekscitite respondis la malgranda auto-amiko, „Ĉu vere? Tion mi ne povas kredi, Rudi," dubis la patrino.

„Jes, panjo, fakte. Kiam mi iris el la lernejo, staris antaŭ la hotelo apud nia lernejo belega IFA-aŭteto. Apud la IFA-aŭto staris sinjoro, Mi iris al la sinjoro, ĝentile salutis lin kaj demandis: „Sinjoro, ĉu tio estas via IFA-eto?"

La sinjoro ridetis kaj respondis: „Jes, ĉu ĝi plaĉas al vi?" Kaj mi diris: „Jes, sinjoro, tre.... donacu al mi la aŭton." La sinjoro denove ridetis kaj respondis : „Ne , knabeto." Se li estus dirinta "jes" la auto estus jam mia."

El la germana: Karl Bauer, Vieno Aŭstrujo.



La deveno de la kroata blazono

El Kroatio

Serboj, kroatoj kaj slovenoj estas sudslavoj. Ili unuiĝis kaj fondis post la unua mondmilito belan kaj fortan ŝtaton – Jugoslavion.

En la mezepoko dum centjaroj la kroatoj devis batali kontraŭ la urbo Venecio, kiu tiam estis forta kaj tre riĉa respubliko. Ĉiaj komercŝipoj veturis sur la Adriatika maro kaj alportis grandajn riĉaĵojn al siaj posedantoj. La dalmatia marbordo havas multajn bonegajn havenojn kiuj tute mankas al la venecia marbordo.

Tiutempe havis la kroatoj sian propran ŝtaton, al kiu apartenis ankaŭ Dalmatio. Dum la regado de potencaj regnestroj la Venecianoj pagis al kroatoj tributon, por povi alboridiĝi en dalmatiaj havenoj. Sed kiam en Kroatio regis malfortaj reĝoj, la Venecianoj rifuzis pagi la tributon. Pro tio ekestis en la 11-a jarcento granda milito inter la venecia doĝo Orseolo kaj la kroata reĝo Držislav. Sur ambaŭ flankoj estis granda nombro da militŝipoj. La feliĉo favoris al la Venecianoj kaj ili venkis en terura surmara batalo. Držislav estis kaptita kaj Orseolo ĵetis lin en malliberejon sub la doĝa palaco.

Post kelka tempo vizitis Orseolo sian kaptiton. La reĝo ŝakludis kun si mem kaj ne rimarkis la enirinton - doĝon. Jen li movis la figurojn de sia imagita kontraŭludanto. Post ioma tempo da doĝo diris: "Mi vidas, ke vi estas sperta ŝakisto. De nun mi ĉiutage venigos vin en mian palacon kaj vi ludos kun mi ŝakon kaj vi estos mia gasto. Se vi venkos min trifoje sinsekve, mi redonos al vi liberecon. Sed bone atentu, ankaŭ mi ne estas komencanto!"

Dirite, konsentite. Ili ekludis. Tagojn, semajnojn daŭris la ludado. Ĉiumatene estis Držislav eskorte alkondukata en la palacon kaj vespere sammaniere forkondukata en la malliberejon. Fine li sukcesis venki la doĝon trifoje sinsekve. Orseolo plenumis sian honoran promeson . Solene kaj kun granda pompo li akompanis la reĝon ĝis la limo de lia patrujo.

De tiu tempo estas en la kroata blazono blua ŝaktabulo kun 25 ruĝaj kaj 25 arĝentaj kvadrantoj.

El la kroata: Izidor Rižnar.



La koboldo

Dana popola rakonto

Iam vivis viro, kiu loĝis en domo, en kiu troviĝis koboldo. La koboldo estis malbona kaj ĉiel turmentis kaj ĝenis la viron. Fine la viro decidiĝis, ke li transloĝiĝos, poste la koboldo restu en la malnova loĝejo! Sed okazis alie ol la viro pensis.

Ĉio jam estis transloĝigita en la novan domon kaj restis nur unu ŝarĝveturilo kun malplenaj bareloj kaj aliaj senvaloraĵoj. Ĝuste kiam la viro volis ekveturi, li ekvidis ruĝan ĉapeleton malantaŭ barelo, kiu staris plej supre sur la veturilo. La ĉapeleto apartenis al la koboldo. Li mem nun vidigis sian tutan kapon kaj malice ridegante li diris: „Ho jen! Ni do transloĝiĝas?”

El la dana tradukis Holger Hansen, Holbak Danujo.

La pia Jozefo

Juda rakonto el Talmund

Josefo estis malriĉa, sed tre pia judo. Por la ŝabato li ĉiam aĉetis la plej bonan kaj plej multekostan fiŝon. Lia najbaro estis viro tre riĉa, kiu havis multe da mono kaj posedis multajn domojn kaj kampojn. Sed li ĉiam timis, ke li povus perdi sian riĉaĵon kaj tial li vendis sian tutan posedaĵon kaj je la mono aĉetis unu solan grandan diamanton. Li enmetis ĝin en sian ĉapelon, por ke li ĝin havu ĉiam ĉe si.

Foje li promenis sur la riverbordo kaj subita ventego forblovis lian ĉapelon kun la multekosta ŝtono en la riveron. Tuj venis granda fiŝo kaj ĝin englutis. Post kelkaj tagoj fiŝisto kaptis la fiŝon kaj volis ĝin vendi. Sed neniu volis aĉeti altprezan fiŝon. Li atendis tutan vendredon. Fine venis la pia Jozefo kaj aĉetis ĝin. Kiam lia edzino distrancis la fiŝon, ŝi trovis la diamanton. La malriĉa sed pia Jozefo fariĝis riĉulo.

El la hebrea tradukis al Esperanto Pinhas M.Lachowitzky, Jeruzalemo



La mensogul-ponto

Germana rakonto

Kurt estis malgranda mensogema knabo. Foje li iris promeni kun sia patro. Ili ekvidis grandegan hundon. Kaj la patro diris: „Kurĉjo, rigardu, tiel grandan hundon oni vidas malofte." Sed Kurt malŝate diris: „Ho, hieraŭ mi vidis multe pli grandan hundon, mi ne mensogas, ĝi estis granda kiel bovino."

Post kelka tempo diris la patro: „Kurĉjo, ĉu vi scias, ke ni iros trans la mensogul-ponto?" Kurt respondis: „Tio estas stranga nomo, kial ĝi nomiĝas tiel?"

„Kial? Nu, kiam sur la ponto iras homo, kiu mensogis, la ponto rompiĝas sub li kaj la mensoginto falas en la riveron."

Kurt ektimis kaj post ioma hezito li diris: „La hundo de hieraŭ ne estis tiel granda kiel bovino, sed kiel bovido ĝi estis tute certe."

La patro ridetis, sed silentis. Ili venis al ponto.

„Vidu, tio estas la mensogul-ponto," diris la patro. Kaj la fileto ekbalbutis: „Paĉjo, la hundo estis granda nek kiel bovino, nek kiel bovido, ĝi estis tute ordinara hundo, malpli granda ol tiu, kiun ni ĵus vidis”.

El la germana Otto Schneider, Germana Federacia Respubliko.



Renkontiĝo

Franca humuro

Tartarin el Taraskono, la fama fanfaronulo, venis antaŭ cent jaroj Alĝerion por ĉasi leonojn. En la poŝtveturilo, en kiu li veturis, demandis lin malgranda ne tro forta viro: "Ĉu vi mortigis jam multajn leonojn, sinjoro Tartarin?"

„Ha, kia demando! Sinjoro, mi nur dezirus, ke vi havu tiom da haroj sur la kapo!"

La kunvojaĝantoj ridis kaj rigardis la tri flavajn harojn starantajn sur la kranio de la malgrandulo. Alia vojaĝanto kaptis la parolon: „Via profesio estas terura, sinjoro Tartarin. Vi certe multfoje trapasis malagrablajn momentojn, kiel ekzemple la kompatinda sinjoro Bombonnel."

„Ah , jes, la mortiganto de aĉaj panteroj!" diris Tartarin malŝate. „Ĉu vi konas lin?" demandis la malgrandulo.

„Ha, per Dio! Jes ja mi konas lin ... ni ĉasis kune pli ol dudekfoje."

La malgrandulo ridetis: "Vi do ĉasas ankaŭ panterojn, sinjoro Tartarin?" „Nu , kelkfoje ... por pasigi la tempon."

Tiam la veturilo haltis. La malgrandulo stariĝis kaj forlasante la veturilon, li diris al Tartarin: „Aŭskultu mian konsilon, sinjoro Tartarin, mi volas diri al vi la veron: vi perdas vian tempon ĉi tie. Restas tie ĉi nur kelkaj panteroj, sed tia ĉasaĵo ne sufiĉas por vi. Kaj la leonoj eĉ ne unu restas plu." Post tio la malgrandulo ridante foriris.

„Kondukanto! Kiu estas tiu ĉi viro?" demandis Tartarin.

„Kiel? Ĉu vi ne konas lin? Tio estas ja sinjoro Bombonnel!"

El la franca: F. Boyet, Angers, Francujo.



La malobeema ĉinkoleta

Ĉilia porinfana rakonto
de prof-ro M. Gizmán Maturana

En la supro de la branĉaro de diktrunka arbo kaŝis neston ĉinkoletoj kun tri birdetoj. Dum la patrino kovris ilin per siaj flugiloj, la patro iris serĉi semetojn kaj vermetojn por nutri ilin.

La birdetoj kreskis rapide kaj iliaj korpetoj kovriĝis per plumetoj. La patrino jam povis forlasi siajn filetojn kaj ili povis resti solaj dum kelka tempo. Sed ĉar la ĉinkoletoj ne povis ankoraŭ flugi, la patrino antaŭ ol eliri admonis ilin: „*Ku.lii, ku-lii*” tio signifas: „Filetoj miaj, ne eliru el la nesto.”

Iutage, kiam la gepatroj estis for, unu el la birdetoj volis provi flugi, sed apenaŭ ĝi forlasis la randon de la nesto, tuj ĝi falis teren.

Kiam la patro kaj la patrino revenis, ili trovis nur du ĉinkoletojn, kiuj estis tre malĝojaj kaj pepis: „*Ku-ili, kulii*” tio nun signifis: „Nia frateto, falis kaj mortis.” La tuta ĉinkoleta familio funebris pro la morto de la fileto... Tion kauzis ĝia maloobeemo.

El la hispana tradukis Luis Cuadra, Santiago de Ĉilio.



Kodros

Antikva greka mito

La reĝo Kodros regis en la antikva Ateno, kiam la Doroj estis atakontaj lian urbon, li rapidis al la urbo Delfo por konsulti la tiean aŭgurejon.

„Kiu venkos?!” li demandis. Kaj la fama aŭguristino Pitto respondis per jena orakolo: "Venkos tiu partio, kies reĝo estos mortigita de la kontraŭuloj.

Aŭdinte tiun ĉi orakolon, la Doroj tre atentis, por ke neniu mortigu la reĝon Kodros. Sed Kodros volis oferi sian vivon por savi la patrujon. Tial li alivestis sin je simpla kamparano, prenis garbon da branĉoj kaj hakilon kaj penetris ĝis en la malamikan tendaron. Tie li intence ekdisputis kun soldato kaj fine li eĉ vundis lin, La kamarado de la vundito ekkoleriĝis. Ĵetis sin kontraŭ la aŭdaca vilaĝano kaj mortigis lin.

Kiam diskoniĝis la sciigo, ke la mortigito estas la reĝo Kodros, la Doroj perdis ĉiun esperon venki la Atenanojn kaj revenis hejmen. Tiel savis la patrujamo de la reĝo Kodros Atenon, kiu solene entombigis sian heroan savinton.

El la greka: Stavros Petrus, Ateno Grekujo.



La suno por la koro

Porinfana rakonto

Foje mi promenis en la kamparo kaj venis al vojeto plena de silento. Ĉe kurbiĝo de la vojeto staris diktrunka arbo. Sub ĝiaj branĉoj mi ekvidis malgrandan kaj malriĉan dometon. En la herbo antaŭ la kabano kuŝis blonda sepjara knabeto. Li kuŝis en la plena varmega sunbrilo.

„Ĉu estas al vi malvarme?“ mi demandis lin.

„Al mi? Ne, la suno estas por mia fratineto.“

„Ĉu por via fratineto? Mi ne komprenas.....“

„Mia fratineto kuŝas jam du semajnojn sur la lito kaj senĉese ploras, ĉar estas malvarme al ŝi. Kaj mi kolektas por ŝi sunon kaj varmon.“

Mi volis solvi tiun ĉi enigmon. Mi restis kaj rigardis la infanon. Subite li ekkriis: „Binjo, mi jam havas multe da suno kaj varmo, mi tuj venos.“

La blonda knabeto enkuris en la kabanon. Mi ne scias kial, sed mi eniris post li.

„Ĉu vi sentas la varman sunon?“ mi aŭdis lin diri kaj samtempe li karese ĉirkaŭprenis sian malsanan fratineton.

„Ĉu vi sentas la varman sunon? Nun mi alportis multe da suno kaj varmo, ĉu estas jam varme al vi, Binjeto?“

Alpremita al la varma korpeto, ŝarĝita per matena sunbrilo, la malsana infaneto malfermis ĝoje siajn grandajn, songemajn, nigrajn okulojn. Poste ŝi malrapide fermis ilin kaj trankvile ekdormis.

Verkis Rubén Čoto, el la hispana tradukis Hektor Fernández Vargas, Kostariko, Centra Ameriko.



Kial ursoj ne havas voston

El Danio

Estis vintro. La riveroj estis tute kovritaj per glacio. La vulpo, kiu malsategis, deziris kapti kelkajn fiŝojn. Ĝi faris truon en la glacio, kuŝiĝis apud ĝi kaj kiam la fiŝoj alproksimiĝis, ĝi rapide kaptis ilin. Kiam ĝi estis sata, ĝi daŭrigis sian vojon.

Survoje ĝi renkontis la urson. „Mia kara amikino, kie kaj kiel vi kaptis tiujn bongustajn fiŝojn?” demandis la urso. „Ho, kuzo mia, venu kun mi kaj mi tion montros al vi,” promesis la vulpo.

Kiam ili venis al la truo en la glacio, la vulpo diris: „Metu vian belan buklan voston en tiun ĉi truon kaj ĉiuj fiŝoj alvenos kaj alkroĉiĝos al ĝi. Tiam rapide ĝin eltiru!”

La urso efektive sidiĝis plenkonfide kun la vosto en la glacio. Pensante pri la fino, la vulpo ruze ridetis pri la stulteco de la urso. Kiam la vulpo pensis, ke la vosto de la urso jam firme enfrostiĝis en la glacio, diris: „Nun rapide kaj forte eltiru vian voston. Multaj belaj fiŝoj jam pendas sur ĝi.” Kaj la urso, kies malsato estis nun ankoraŭ pli granda, obeis la vulpon, sed ho ve! La vosto forŝiriĝis kaj restis sub la glacio. Kaj tie ĝi estas ankoraŭ nun...

De tiu tempo la ursoj ne havas voston.

El la flandra Jan Jacobs, Antwerpen, Flandrujo, Belgio.



La plej bona kuracisto

El Litovio

Estis foje iu malsaneta sinjoro. Neniu kuracisto kapablis helpi lin. Foje en somero li volis forveturi en banlokon. Survoje li antaŭe vizitis sian amikon.

„Kio verdire estas al vi?“

„Hm, mi ne manĝas, nenio gustas al mi. Nun mi vojaĝas en banlokon.“

„Ne veturu, amiko, nunjare estas tie malbone. Mi donos al vi leteron por mia amiko, tie la kuracistoj estas pli bonaj kaj vi mem fartos tie multe pli bone.“

La paciento konsentis, prenis la leteron kaj forveturis en la nomitan lokon. Tie la gemastroj afable akceptis lin kaj regalis: komence po malmulte kaj iom post iom ili tute ebriigis lin. Fine li ekdormis. La gastigantoj senvestigis lin kaj vestis lin en simplan veston kaj ŝuaĉojn de laboristo. Poste ili forveturigis lin en alian bieneton kaj kuŝigis lin inter laboristoj sur pajlon en stalo. Matene, kiam tagiĝis, la sinjoro vekigis kaj terure ektimis: li, kuŝanta sur pajlo...en stalo...vestita per laboristaj vestaĉoj ... li ne sciis, ĉu li songas, ĉu tiel nur ŝajnas al li.

Baldaŭ venis la mastro peli laboristoj al laboro.

„Kial vi pelas min al laboro, mi estas ja sinjoro Tiukajtiu!“


„For al laboro!“ ekkriis la mastro kaj forpelis lin kun ceteraj laboristoj. Li ricevis rastilon, ĝi elfalis el liaj mallertaj manoj. En sia mallerteco li ne sciis, kion fari. Tamen li devis labori.

Post kelkaj semajnoj bongustis al nia malsanetulo ĉiuj manĝaĵoj ... nenian sanigilon, nenian kuraciston li plu bezonis. Tiam bienposedanto aranĝis por la laboristoj grandan festenon. Ili denove ebriigis la resaniĝintan riĉulon, vestis lin denove per liaj propraj vestoj kaj forportis lin en la loĝejon de la posedanto.

Frumatene li vekigis. Li estis malsata kaj tre deziris manĝi. Ridante diris la bienulo: „La laboro estas tamen bona kuracisto.“

B.Giedra, Ŝiauliai, Litovio

LMR, La Mondo Rakontas, kompilis Theodor Kilian. p.37



La kontento

El la gazeto „El popola Ĉinio“
por La Mondo Rakontas.

Unu viro havis amikon, kiu mortis kaj fariĝis feo. Foje renkontis la viro la mortinton kaj rakontis al li pri sia malfacila vivo. La feo atente aŭskultis lin kaj poste li montris per la fingro al briko, kiu kuŝis apud la vojo. La briko tuj fariĝis ora briko kaj la feo donacis ĝin al sia amiko. Sed la viro tamen ne estis kontenta. La feo rigardis tion kaj montris per la fingro al granda ŝtona leono. Kaj el la ŝtona leono tuj fariĝis ora leono, kiun la feo ankaŭ donacis al sia amiko. Sed la viro ankoraŭ ne estis kontenta.

„Kiel mi faru vin kontenta?“ demandis lin la feo.

La viro post ioma hezitado kaj ĉirkaŭfrazado fine diris: „Donu al mi ... vian fingron.“



La floro de filiko

Pola fabelo

Kiu trovos floron de filiko, tiu havos feliĉon; sed malfacie estas trovi ĝin. Tiel kredas la popolo.

Foje iris malriĉa knabo meze de malluma nokto en arbaron trovi ĝin. Lia patro pereis en la milito, lia patrino estis malsana kaj liaj gefratoj ankoraŭ malgrandaj. Li tre amis ilin, sed ne povis nutri ĉiujn, ĉar li mem estis ankoraŭ malforta dekdujara knabo. Tamen li deziris, ke ili estu feliĉaj. Tial li nun serĉis en la malluma arbaro la floron de filiko ...

Subite li ekvidis fantonon, kiu sekrete vagis inter la arboj. Li forte ektimis kaj alpremiĝis al arbo. En la sama momento ĉie ĉirkaŭ li ekbrilis floroj. Li volis forŝiri unu el la floroj, la mano jam tuŝis ĝin, sed nun li ekvidis apud si belan brilantan estaĵon, kiu ridetis kaj diris al li, kvankam oni ne aŭdis ian voĉon: „Mi donacos feliĉon al vi por tiuj, kiujn vi amas. Nur en ilia feliĉo vi trovos vian propran feliĉon, laborante por ili kaj amante ilin pli ol vi mem, ĉar la floro de filiko estas amo. Mi metos la floron de filiko en vian koron antaŭ ol ĝi velkos sur tiu ĉi branĉeto ĉe la unua sunradio de la tago.“

La ora flamo estingiĝis, la hela estaĵo malaperis. Kaj kiam la knabo malfermis la okulojn, li kuŝis sur la tero. En liaj oreloj ankoraŭ sonis la vortoj: „La floro de filiko estas amo!“

Laŭ fabelo de C. Niewjadomska
rakontis Fela Zawodnik, Korzec, Pollando.



La Vicadmiralo Kalmikov

Rusa legendo

Petro la Granda sendadis siajn junajn aristokratojn alilanden, por ke ili tie studu. Inter aliaj li sendis eksterlanden ankaŭ junan maldiligentan nobelon, kiu tie la tutan tagon nur drinkis kaj manĝis. Sed lia servutulo, kiu estis Kalmiko, lernis ĉion, kion devus lerni lia sinjoro kiel estonta militŝipara oficiro.

Post certa tempo ili revenis hejmen. Sekvis tre severa ekzameno, ĉar ekzamenis la imperiestro mem. Li donis al la junulo matematikan taskon. Sed li ne sciis solvi ĝin. La servutulo sciis la solvon kaj subdiris ĝin ĉe la tabulo al sia sinjoro. Sed la caro tion rimarkis.

Li venis al la tabulo, forpelis la nobelon kaj donis al la servutulo alian taskon. La Kalmiko rapide solvis ĝin. Tio plaĉis al la caro. Li ekzamenis lin pri ĉio, kion devus scii militŝiparaj oficiroj. En la fino de la ekzameno li diris al servutulo: „Mi gratulas al vi kiel al mia miĉmano**. Prenu vian estintan sinjoron kiel militŝiparan soldaton kaj per bastono faru el li bonan oficiron por mi!“

Tiam la Kalmiko surgenuiĝis antaŭ la caro kaj petis lin, ke li permesu al lia estinta sinjoro forveturi en lian vilaĝon. Petro permesis tion, ĉar mallaboremaj nobeloj devis vivi en vilaĝoj, kiuj apartenas al ili, sed ne rajtis loĝi en la ĉefurbo.

Tiu ĉi Kalmiko fariĝis la fame konata vicadmiralo Kalmikov.

V. V. Majnov, Leningrad, Sovetunio



La florkronoj de Havajo

Popola havaja kutimo

Ĉiu, kiu foje vizitis la Havajan Insularon, volonte rememoras nian belan kutimon. Kiam iu forveturas aŭ revenas al la Insularo, liaj amikoj metas ĉirkaŭ lian kolon belajn florkronojn. Se la foriranto aŭ alveninto havas multe da geamikoj, li ricevas tiom da florkronoj, ke ili preskaŭ kaŝas lian vizaĝon.

Kiam la forveturanta ŝipo preterpasas la Diamantan Rokon, la homoj ĵetas la donacitajn florkronojn maren. Se ili flosas reen ĝis la marbordo, oni certe revenos al la Insularo. Tiel oni diras kaj kredas

Ĉu vi, mia ĉeĥa amiko, ne volus min viziti? Venu, kaj mi bonvenigos vin per la plej bela florkrono!

Verkis kaj sendis Herbert L.Thompson, Honolulu, Havaja Insularo.



La Granda Kanaria Reĝolando

Dum kelkaj jarcentoj tiu ĉi fama insularo ne sciis, kio estas monarĥio. Ĝi estis dispartigita en malgrandajn respublikojn. Sed la lerteco de virino ŝanĝis ĉi tiun respublikan formon malmultajn jarojn antaŭ la alveno de hispanoj, kiuj konkeris la insularon. La revolucion efektivigis junulino nomita Andamana. Ŝiaj samlandanoj alte ŝin respektis kaj blinde obeis. Ŝiaj elokventeco kaj spirita matureco, beleco kaj altkreska figuro, moroj kaj kutimoj, ĉio estis eksterordinara ĉe ŝi. Sed specialan talenton ŝi havis por politikaj aferoj. Nek milito aŭ paco, nek rekompenco aŭ puno estis decidataj sen ŝi.

Tamen ne mankis homoj enviemaj, kiuj kontraŭdiris ŝiajn konsilojn kvankam ili estis bonaj. Andamana ekkoleriĝis pro la malfavora sinteno de parto da siaj samlandanoj kaj ŝi decidiĝis submeti por ĉiam sub sian regadon la tutan popolon. Tiucele ŝi edziniĝis al la brava estro Gumidafe. Per lia forta armeo, sed pli per sola ĉeesto ŝi submetis ĉiujn respublikojn de la insuloj al si kaj sia edzo. Sed venis la hispanoj kaj la libera insularo fariĝis dependa kolonio.

El la hispana Jose S Báez, Las Palmas,
Gran Canaria.



Aveto rakontas

Norvega humuro

Kiam mi estis ankoraŭ juna, ni havis instruiston, kiu volonte parolis pri aferoj tiam ankoraŭ ne instruataj en popolaj lernejoj. Precipe li ŝatis paroli pri la formo de nia Tero.

„Multaj homoj opinias, ke la Tero estas plata“, li diradis al ni, „sed tio ne estas vero, ĝi estas globforma, precize kiel mia flartabakujo.“ Ĉe tiuj ĉi vortoj li ĉiam elprenis el sia veŝtpoŝo globforman skatoleton kaj montris ĝin al ni.

Li estis tre fervora instruisto kaj tial li ofte instruis ankaŭ dimanĉe posttagmeze. Kaj ankaŭ tiam li parolis pri la formo de nia Tero. Sed dimanĉe li uzis alian tabakujon, pli belan, sed ĝi estis kvarangula. Kaj ankaŭ dimanĉe li ripetadis sian ŝatatan instruon: "La Tero ne estas plata, kiel kredas naivaj homoj, ne, ĝi estas kiel mia flartabakujo." Ĉe tiuj ĉi vortoj li elprenis el la poŝo la kvarangulan skatoleton kaj montris ĝin al ni.. Li mem ne rigardis ĝin kaj tial li ne rimarkis sian eraron.

Foje vizitis nin la inspektisto kaj la instruisto volis montri al li, ke liaj lernantoj scias pli multe ol la aliaj. Tial li demandis mian najbaron: „Kian formon havas nia Tero?“

Kaj li respondis: „Nia Tero estas ses tagojn en la semajno globforma, sed dimanĉe ĝi estas kvarangula.“

El la norvega Torbjorg Simonsen Trondhejm, Norvegujo.



Patrik, la ŝafista knabo de Siemiŝ

Rakonto el la irlanda historio

Kvarcent jarojn post Kristo, la knabo, nomita Patrik, paŝtis ŝafojn sur la monteto Siemiŝ en Irlando. Li estis soleca knabo kaj lia rigardo estis ofte malĝoja kaj malproksimen direktita. Unu el la irlandaj reĝoj alportis Patrik-on kiel kaptiton al Irlando el fremda lando kaj vendis lin kiel sklavon. Patrik estis filo de kristanaj gepatroj. En sia soleca vivo li multe preĝis kaj pensis pri Dio.

Pasis ses jaroj kaj la knabo sukcesis forkuri al siaj parencoj, sed li ne povis forgesi la belan Irlandon. Malĝojigis lin la penso, ke la irlandanoj estas ankoraŭ idolanoj. Li solene promesis, ke unu tagon li revenos kaj predikos al ili la Evangelion.

Pasis dudek jaroj. Grandaj amasoj da irlandanoj veturis al la urbo Tara por festi la tagon de la dioj Fajro, Aero, Vento kaj Lumo kaj de la reĝo Leary. La gereĝoj venis en multkoloraj vestoj. Venis la klanestroj, la bardoj kun siaj harpoj, sorĉistoj en longaj roboj, kleruloj kaj juĝistoj. Ili ĉiuj festis la sanktan tagon en la ĉambregoj de Tara, laŭte sonis la kantoj kaj harpoj.

Multajn horojn jam daŭris la festo. Fine alvenis la tempo por ekbruligi la Sanktan Fajron sur la monteto de Tara. Laŭ antikva tradicio neniu alia fajro rajtis bruli dum tiu ĉi nokto. Tra la tuta lando la popolo atendis la lumon de la Sankta Fajro. Fine ĝi ekbrulis, ĝi malrapide pligrandiĝis kaj ĉiuj ĉeestanoj rigardis ĝin kun sankta timo. Subite ekkrio! Jen alia fajro lumigis la supron de apuda monteto. Kiu kuraĝis ekbruligi ĝin? Kiu malobeis la antikvan sanktan leĝon?... Estis Patrik, la estinta ŝafisto.

La reĝo kaj la popolo furiozis. La reĝo sendis por la ofendinto de la dioj. Spite la danĝeron Patrik venis. Li parolis pri la vera Dio, la kreinto de la fajro, aero, vento kaj lumo, li parolis pri Jesuo Kristo. Dum li parolis, multaj viroj ekkredis liajn vortojn kaj petis, ke li baptu ilin. De tiu tago ĝis la fino de sila longa vivo Patrik tramigris ĉiujn partojn de la lando predikante la novan kredon. En multaj lokoj li konstruigis la unuajn preĝejojn. Patrik fariĝis la apostolo kaj la patrono de Irlando. Lian mortotagon, la 17-an de marto, la irlandanoj festas kiel tago de Sankta Patrik.

El la irlanda McCormick, Inĝ-ro, Dublin, Irlando.



La juĝisto kaj la ostron

Promenante laŭ la marbordo, du viroj trovis ostron kaj komencis disputi pro ĝi.

„Mi ĝin vidis la unua, do ĝi apartenas al mi,“ diris unu el la viroj.

„Mi levis ĝin kaj tial ĝi apartenas al mi,“ diris la dua.

Dum ili kverelis, preterpasis juĝisto kaj ili petis lin, ke li juĝu la aferon.

La juĝisto konsentis. Sed antaŭ ol doni sian decidon, li diris: „Permesu, ke vi estos kontentaj, kiel ajn mi decidus.“

La viroj promesis. Tiam diris la juĝisto: „Ŝajnas al mi, ke vi ambaŭ povas pretendi la ostron; do mi egale dividos ĝin inter vi.“

Malferminte la ostron, la juĝisto rapide englutis ĝin kaj poste li tre solene donis al ĉiu viro unu el la malplenaj konkoj.

„Sed vi manĝis ja mem la ostron,“ ekkriis la viroj.

„Ho, tio estas mia honorario por mia juĝo en la proceso,“ diris la juĝisto, „sed mi dividis tute juste inter vi ĉion, kio restis.“

Wimfred E.Carter, Bradford, Yorks, Britujo.



La lasta folio

Rakonto el la malnova parto de Nova Jorko
laŭ rakonto de O. Henry esperantigis E. E. Dodge, Washinton, Usono

Jonjo kuŝis senmove en la lito. Su, ŝia amikino kaj kunloĝantino, sidis apud ŝia lito kaj zorgeme rigardis ŝian febran vizaĝon. Ili ambaŭ estis junaj pentristinoj kaj havis sian atelieron en malnova domo, kie ili ankaŭ loĝis. Jonjo estis el la suna Kalifornio kaj ĉiam sopiris pentri foje la golfon de Neapolo.

„Pneŭmonio,“ diris la maljuna kuracisto, kiun Su venigis. „Se ŝi volos vivi, ŝia ŝanco estas ... unu al dek. Sed via amikino, ŝajnas, ne volas resaniĝi kaj pensas kaj parolas nur pri la morto. Se ŝi demandus vin, ni diru, pri la plej nova vintra modo de virinaj manteloj, ŝia ŝanco estus ... unu al kvin.“

Dume la malsanulino rigardis al la fenestro kaj kalkulis: „Dek du,“ post kelka tempo, „dek unu kaj poste „dek ... naŭ“ kaj poste preskaŭ samtempe „ok, sep.“

Su rigardis el la fenestro kaj vidis malĝojan korton kaj muron kun maljuna hedero.

„Kion vi kalkulas, Jonjo?“

„La foliojn de la hedero. Antaŭ tri tagoj estis da ili ankoraŭ preskaŭ cent ... kaj preskaŭ ĉiuj jam defalis; kiam defalos la lasta, ankaŭ mi devos foriri.“

„Karulino, mia, kion komunan havas folioj de hedero kun via resaniĝo?“ demandis Su malespere.

„Kvin, restas nur kvar,“ apatie diris Jonjo.

Venis la maljuna Behrman, kiu loĝis en la sama domo, por sidi al Su modelo. Li mem estis pentristo kaj kvardek jarojn li vane esperis, ke li foje sukcesos pentri majstro-verkon. La maljuna fraŭlo Behrman amis ambaŭ knabinojn kiel proprajn filinojn. Li estis malespera, vidante la kompatindan Jonjon.

„Tri ... du ... restas nur unu ... kiam defalos la lasta, mi mortos.“

Ekstere hurlis malvarma novembra ventego miksita kun pluvo.

„Hodiaŭ nokte la ventego forŝiros la lastan folion ... kaj mi mortos,“ lace diris Jonjo kaj ekdormis. Behrman reiris en sian ĉambbron.

Mateno. Su flanken ŝovis la kurtenon. Jen! La lasta folio pendis sur la hedero! Ĝi sukcesis spiti la noktan ventegon! Jonjo rigardis ĝin kun miro ... ŝi longe kaj ĝoje rigardis ĝin. Fine ŝi diris: „Su, mi esperas, ke mi foje pentros la golfon de Neapolo ...“

Jonjo malrapide resaniĝis. Pasis du tagoj. Su ĉirkaŭprenis sian amikinin kaj diris: „Mi devas ion diri al vi, blanka kolombeto mia ... Hodiaŭ mortis nia bona Behrman je pneŭmonio. Li ne malsanis longe. En lia ĉambro oni trovis lian veston kaj ŝuojn tute malsekaj kaj glacie malvarmaj ... Kaj nun rigardu el fenestro kaj bone rigardu la lastan folion! Ĉu vi ne miris, ke ĝi neniam moviĝas? Ke eĉ la plej furioza ventego ne sukcesis skui ĝin? Mia karulino, nia kompatinda

Behrman pentris ĝin en tiu ventega, pluva nokto, kiam defalis la lasta folio ... li tamen sukcesis pentri sian majstro-verkon ...“



2020 Esperanta Rondeto Mladá Boleslav, Ĉeĥio.
drahotova@esperanto.cz